



“LA CIVILULOJ ESTAS LA CELO DE LA ATAKO KONTRAŬ AFRINO(1)”

Salih Muslim. Eksprezidento de la PUD(2).

Salih Muslim (Kobano, 1951) estas eksprezidento de la PUD kaj proparolanto pri eksteraj rilatoj de la MDS(3). MDS estas la reganta forto en la Demokrata Federacio de Norda Sirio(4), regiono nomata ankaŭ Roĵavo. Pasintan sabaton(*) la turka armeo komencis ampleksan militan operacon kontraŭ la urbo Afrino kaj ties regiono, en la landlimo inter Turkio kaj Sirio. Tiu agreso estis multfoje anoncita kaj jam komencis kaŭzi viktimojn.

Turkio estas atakanta Afrinon, sed Rusio kaj la reĝimo de Al-Assad simulas tion ne vidi. Kial Afrino? Kial nun?

De 2011 Afrino estas kiel enklavo, sekura loko, kaj Turkio neniam agnoskis tiun realaĵon. Dum kvin jaroj ĝi klopodis tion ŝanĝi, sed sensukcese, tial ĝi pretigadis tiun ĉi invadon atendante oportunan momenton.

Ni kredas, ke pri tiu ĉi atako estis interkonsento inter Turkio kaj ties solduloj, Rusio kaj la Siria Registaro. Afrino estis, simple, la marĉandaĵo.

Ĉu vi povas precizigi, kial nun estas momento oportuna por Turkio?

Oni devas substreki, ke koincidis kaj la atako kaj la “liberigo” de Abu al-Duhur, aerbazo norde de Idlibo, kiu estis en la teritorio de la Fronto de la Venko(5). Tuj post kiam la trupoj de la Al-Assad-reĝimo “liberigis” tiun aerbazon, komencis la flugatakoj de Turkio kontraŭ Afrino; niaopinie klaras, ke ambaŭ okazaĵoj estas ligitaj. Krome Turkio rivecis la konsenton de Rusio kaj la Al-Assad-reĝimo, sendube. Temas pri tre ampleksa invado, krom la flugatakoj, la turkaj trupoj klopodas invadi surtere. Ni troviĝas en alia fazo, en nova koncepto pri milito kreita de regionaj povoj.

Kia estas la situacio en Afrino nun?

La flugatakoj komencis sabate, kaj nun ni ne havas kompletan informon, sed ni scias, ke almenaŭ estas tri martiroj: membro de la PPT(6) kaj du de la IPT(7). Same ni povas konfirmi, ke ses civiluloj mortis kaj multaj estas vunditaj (laŭ la dimanĉaj

informoj). Ĝuste la civiluloj estas la ĉefa celo de tiu ĉi operaco. Mi volas substreki, ke mi nature parolas pri civiluloj, kiam mi mencias kaj la PPT kaj la IPT-on, ĉar tiujn ĉi milicojn konsistigas simplaj viroj kaj inoj de Afrino, kiuj prenis la armilojn por defendi ties domojn kaj vilaĝojn. Kiuj prenis la armilojn estas civiluloj.

Kiel statas la civiluloj?

Nun, la homoj serĉas rifuĝejon, en Afrino mem kaj en ties ĉirkaŭaĵo. Ili ne fuĝas, ĉar la limo estas sub la atako. Ili ne povas forlasi la urbon. Ĝuste pro tio mi volas ripeti al la internacia komunumo, ke estas grava risko de genocido. La civiluloj estas kaptitaj en la urbo kaj ĉirkaŭaj vilaĝoj, kaj la turka armeo kaj ties solduloj estas murdantaj civilulojn: inojn, infanojn kaj virojn.

La kurdoj montris, ke ili estas nepraj por ĉiu politika solvo, ne nur en Sirio, sed por la tuta Mezoriento. Tamen, oni ne volas tion agnoski. Kial tioma timo al la kurdoj?

Ĉar la kurdoj unue ekiris la vojon al nova vidpunkto pri la demokratio, pri interpopola samrajteco. Ni starigis novan sistemon kaj funkciigis ĝin; kaj tiu ĉi projekto taŭgas por tuta Mezoriento. Temas pri solidareco inter popoloj, pri egaleco inter seksoj, pri virinrajtoj ... Tiuj ĉi nocioj novas en Mezoriento, kaj la kurdoj estas ĉekape de tiu ĉi procezo. Ĉiuj, kiuj partianas en la establita ordo, kaj ĝenerale kiuj membras en iu povkliko, timas tiun ĉi novan vidmanieron. Ili vidas siajn interesojn riskigitaj, kaj pro tio klopodas haltigi ĉiujn ŝanĝon kaj progreson. Ili timas la kurdojn, ĉar ili timas, ke ĉiuj popoloj de la mondo konscios pri la realigeblo kaj avantaĝo de tiu ĉi vojo al la demokratio. Tio estas, simple, herezaĵo por la siria reĝimo, por Turkio, por la malamikoj de la demokratio. Tial ili atakas nin.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Efrîn.
- (2) Partio de la Unio Demokrata (PUD)/Partiya Yekîtiya Demokrat (PYD).
- (3) Movado por Demokrata Socio (MDS)/Tevgera Civaka Demokratîk (TEV-DEM).
- (4) Federaliya Demokratîk a Bakûrê Sûriyê.
- (5) Jabhat al-Nusra, en la araba.
- (6) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel).
- (7) Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Orsola Casagrande.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 24-an de Januaro 2018-a.

Tradukis: NXC. Provlegis: DS. Februaro 2018-a.

